
# *Díaz-Canel partoprenas la Iberoamerikan Pintkunsidon*




Havano, apr 21 (RHK) La prezidento Miguel Díaz-Canel Bermúdez prezentos la avancojn de Kubo rilate sciencon, teknologion kaj novigadon, kiel fundamentaj aksoj por da?ripova evoluo.

La XXVII-a pintkunsido de ?tatestroj kaj registarestroj sesias el Andoro en formato virtuala, kaj ?i estos oportuna scenejo kie Kubo dividos siajn spertojn rilate la starigon de kvar entreprenoj de alta teknologio kaj du parkoj scienc-teknologiaj.

La insulan delegitaron anka? formas, kune kun la prezidento, la ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez; kaj pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Rodrigo Malmierca, respektive.

?i anka? montros la rilaton de universitatoj kun la institucioj de scienco, teknologio kaj novigado kun la entreprenoj. Kubo anka? prezentos la progresojn en la uzo de organismoj genetike modifitaj en la agrikulturo.

La ministrino de sciencoj, teknologio kaj medio, Elba Rosa Pérez, kiu anka? membras la insulan delegitaron en la Pintkunsido, parolos pri la insula kapablo  fronti la pandemion de Kovim-19 per la evoluigo de kvin vakcinaj kandidatoj, produktado de medikamentoj kaj iloj por  trakti la malsanon.

Al tio ali?as la atingo de propra diagnozilo por magneta ekstrakto de ARN per nanoteknologio kaj la starigo de virtuala enketilo.

Kiel anta?a?o de la XXVII-a Iberoamerika Pintkunsido de ?tatestroj kaj registarestroj, la pasintan 13-15-an, okazis la kunsidoj de naciaj kunordigantoj kaj respondeculoj de kunlaboro, kaj la II-a kunsido de ministrinoj kaj ministroj de eksteraj rilatoj de Iberoameriko.

Sub la slogano “Novigado por evoluo da?rigebla: Celaro 2030.Ibeorameriko frontas la defion de la kronviruso", la Pintkunsido hodia?a pritraktos la defiojn trudatajn de la Kovim-19 kaj la rolon de novigado fronte al la pandemio, kun rekorda ?eesto de ?tatestroj kaj registarestroj.

La virtualan pintkunsidon partoprenas la 22 landoj de la regiono, el kiuj 19 estos reprezentataj de ?tatestroj kaj registarestroj, krom 29 observantoj kaj reprezentantoj de internaciaj organismoj de UN, la interamerika banko por evoluo (BID) kaj la Banko por evoluo de Latinameriko (CAF).

La politikaj gvidantoj adoptos Finan Deklaron, Sindevigon kaj Agadprogramon por ?iuj, samkiel 16 komunikojn specialajn, kiuj estos disvastigataj fine de la Pintkunsido. Krome, okazos la transdono de la sekretariejo portempa al Dominika Respubliko kiel gastigonto de la venonta Pintkunsido en 2022.

fonto: Cubadebate

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/254795-diaz-canel-partoprenas-la-iberoamerikan-pintkunsidon

**Radio Habana Cuba**